

325



# AMERIKA

# ESPERANTISTO



## Dec., 1923

	Page
Kristnasko	D. W. M. Jenkins 1
Notes and News from the Central Office	E. J. Meriam 2
Esperanto in Radio	3
Olibano kaj Mirho	E. S. P. 4
Surmonta Fonto	H. I. Keyes 6
La Unua Kristnasko	8
La Esperanta Movado en Norda Ameriko	8
Recenzo	D. E. Parrish 10
Gazetoj Tutmondaj	11
La Legendo pri la Postlasajo de la Maŭro	D-ro Louis Allen 13

# AMERIKA ESPERANTISTO

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

## BERKELEY, CALIF.

Berkeley Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

## OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

## SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Rooms 309-311 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Slonn, Secretary, 1160 Fell Street.

## MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association.—Meets each Monday evening at 8 in Room 12, The Tooke Bldg. Sec., Miss E. Strachan.

## OKLAHOMA CITY, OKLA.

La Oklahoma Esperantista Societo kunvenas dimanĉe kun Arto kaj Scienco Klubo, 2501 W. Ave. "G", RR6, Box 156, Oklahoma, Okla. C. R. D. S. Oakford, Prez.

## WASHINGTON, D. C.

Kolumbia Esperanto Asocio.—Public meeting, third Wednesday of each month, 8.30 P. M., at the Thomson School, 12th & L Sts., N. W. La Kabea Esperanto Klubo.—Meets every Wednesday, except the third, at 8.30 P. M.—Free class, at 7.30 P. M., same address. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

## CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill. La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

## ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 7th Ave.

## BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. M. Maroutian, Secretary.

## WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

## BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

## PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

## DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 607 Breitmeyer Bldg.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M.—9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—\$1.00.

TOPEKA, KANSAS Esperanto Association, Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-ino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-ino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

## NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M., at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

## WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters; Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

## CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo.—S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

## TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Society meets every Sunday at 4 P. M., and classes are held every Thursday at 8 P. M., in the school room of the Society of Friends, 113 Maitland Street.

Honorary Secretary, S-ro. A. P. H. Rollason, Box 123, Terminal A, Toronto.

## ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas ½-jaran ĵurnalon, "La Studento," ĵara abono \$1.00.

## PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Secy., West Phila. High School for Boys. Barco and monthly meetings on third Tuesdays at Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. (Barco 6.45; business meeting 7.45 P. M.) Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.) Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 509 N. York Ave.

## PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

## MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

# Amerika Esperantisto

ORGANO  
de la  
ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO  
507 Pierce Bldg., Copley Square  
Boston 17, Mass., U. S. A.

---

Vol. 32.

December, 1923.

No. 5.

---

## Kristnasko

En landon orientan venis Li,  
Sendata de Perfekta Harmoni';  
Li venis ĉar la tuta mondhomar'  
La celon havas iĝi mondfatar'.

Saĝuloj vidis signon en ĉiel'—  
La briloj belaj de la matenstel';  
Kaj realizis, en la sankta hor',  
Ke estas naskiĝinta la Sinjor'.

Ni penu ĉiutage, pli kaj pli,  
Memori ke ekzemplon donis Li.  
La Stelo de Espero gvidu nin,  
Ĝis ni eklernos kiel sekvi Lin.

D. W. M. Jenkins

## Notes and News from the Central Office

An authority on Radio News has asked for more details about Esperanto of a relative who has recently taken up the study, saying there must be an international code now that radio communication has been established between different countries. The past few days has witnessed messages between England and America, and this is only the beginning.

To properly develop this important function of Esperanto, a Radio-Esperanto section begins with this issue.

To make it worth while every item on the subject should be sent to the Central Office. Plan broadcasts in your own town; send word when they are to be; notify if you wish to receive announcements, and we will send them to you in time to get them in your local papers. Report your success in hearing the broadcasts and send newspaper clippings.

A young Esperantist just arrived from his native town of Bialystok, and visiting a brother here, recently called at the Central Office with greetings from the home of La Majstro. Of course he "speaks it like a native," and the brother was much impressed not only with Esperanto as an auxiliary language, but with Esperantism which assures a cordial reception to strangers in a strange land. An invitation has been extended to him to visit a Philadelphia samideano who had given him lessons in English by correspondence. In appreciation of what America has done for them, the family has taken the American rendering of their name on becoming naturalized, and Edward N. Parsons, of 43 So. Prospect Street, Youngstown, Ohio, would be glad to meet or correspond with young Esperantists in Usono.

A clipping from the Dearborn Independent says:  
"Poetry and songs in Esperanto are appearing in polyglot centres in Europe." Why bring coals to Newcastle? Our poet S-ro Keyes furnishes a poem every month for Amerika Esperantisto, and our Dr. Lowell "Esperantized" the song broadcast from the Shepard Stores last week, "Velveturante la Bluon."  
**Next!**

## Esperanto in Radio

The purpose of this column is to publish news of radio broadcasts in or about Esperanto.

Items for same should be sent to the Central Office promptly that notices may be sent out to those interested.

"La Presse" of Montreal, CKAK, 430 meters, 697 Kc, has arranged for two causeries on the subject of Esperanto as an International Language to be given by Mr. Charles P. Blackman, F. B. E. A. The first, in English and Esperanto, was given Thursday November 22nd. The second, to be announced, will be in French and Esperanto.

Montpelier (Vt.) reports trying to hear this broadcast without success, though Pittsburgh and other stations were clear.

Although the mineral deposits between Montreal and Toronto made it difficult, an attempt was made to hear the talk but no report has been received.

The Shepard Stores, Boston, WNAC, 278 meters, 1980 Kc, Nov. 28 broadcast a song in both English and Esperanto; "Sailing the Blue"—"Velveturante la Bluon." The head of the department was pleased with the Esperanto rendering and will repeat it in a future program.

The Boston Radio Exposition, December 3-8, had a talk on the use of Esperanto in Radio on its program for Tuesday December 4th, given by Dr. D. O. S. Lowell. This was followed by a broadcast of "Velveturante la Bluon" sung by Miss Humphreys who gave it for the Shepard Stores.

**THE**  
**"EDINBURGH"**  
**Esperanto Pocket Dictionary**

Esp.-Eng. & Eng.-Esp.

Cloth Binding \$0.75    Leather \$1.75

On sale at Esperanto Office or at leading Booksellers.

New York **T. Nelson & Sons, Ltd.,** Toronto

## Olibano kaj Mirho

Foje troviĝis tri reĝoj en la Oriento, kaj ili estis saĝuloj. Ili esploris la ĉielon, kaj vidis iun strangan stelon per kiu ili sciigis, ke en malproksima lando la Reĝo de la Mondo naskiĝis. La stelo signalis kaj ili preparis por longa vojaĝo.

El siaj palacoj ili kolektis riĉajn donacojn, oron kaj olibanon kaj mirhon. Grandajn sakojn plenaj de karegaj ŝtofoj ili metis sur la dorsojn de la kameloj kiuj staris pretaj porti ilin laŭ la vojaĝo. Ĉio estis preta, sed unu el la saĝuloj ŝajnis embarasita kaj prokrastis la foriron de siaj kunuloj kiuj estis avidaj kaj malpaciencaj esti survoje en la direkto al la stelo.

Du el la reĝoj estis maljunaj, kaj la tria estis juna. Kiam la du demandis kial la alia hezitis li ne povis klarigi. Li sciis, ke lia trezora ĉambro estis traserĉita por riĉaj donacoj por la Reĝo el Reĝoj. Ŝajnis al li kvazaŭ li havas nenion pli kiun li povus doni, tamen, li ne estis kontenta.

Li faris nenian respondon al la demandoj de la maljunuloj kiuj ekkriis al li, ke la tempo por foriro jam alvenas. La kameloj iĝis malpaciencaj kaj svingis kaj nazgraŭlis. La ombroj trans la dezerto fariĝis pli longaj. Kaj ankoraŭ la juna reĝo sidis profunde enpena.

Fine, li ridetis kaj ordonis, ke liaj servistoj malfermu la grandan trezoran sakon sur la dorso de la unua el la kameloj. Tiam li iris en ĉambro sub la tegmento de sia palaco kiun li ne vizitis de kiam li estis knabo. Li traserĉis kaj baldaŭ elvenis kaj iris al la karavano. En la mano li portis ion kiu brilis en la radioj de la suno.

La du maljunuloj opiniis, ke li portas ian donacon pli nekutiman kaj karegan ol kian ajn ili povis trovi en siaj trezoraj ĉambroj. Ili kliniĝis por vidi, kaj eĉ la kamelistoj ekrigardis de la dorsoj de la grandaj bestoj por eltrovi kion li havas kiu tiel brilis en la radioj de la suno. Ili estis scivolaj pri ĉi tiu lasta donaco por kiu la karavano atendis.

Kaj la juna reĝo metis ludilon sur la sablon. Ĝi estis eta hundo el stano, pentrita blanka kaj punktita de nigraj makuletoj. Iom de la koloro malaperis lasinte la metalon pura, kaj jen kial la ludilo tiel brihs en la radioj de suno kvazaŭ ĝi estas el arĝento.

La juna saĝulo turnis ŝlosilon en la flanko de la eta nigra kaj blanka hundo, kaj tiam paŝis flanken por ke la du reĝoj

povu vidi. La hundo alten saltis kaj renverssaltis kaj dancadis ĝis fine ĝi falis kaj kuŝis sur la flanko kun fiksita, pentrita ridetaĉo sur la vizago.

Infano, la filo de unu el la kamelistoj, ridis kaj kunfrapis la manojn, sed la du reĝoj restis severaj. Ili riproĉis la plej junan el la saĝuloj, sed li ne atentis, kaj ordonis sian ĉefserviston, ke li kaŭzu al unu el la kameloj genuiĝi. Tiam li levis la ludilon el stano kaj malfermis la trezoran sakon, kaj zorge metis la lastan donacon en la buŝon de la sako, tiel ke ĝi ripozis sendanĝere sur la molaj saketoj de incenso.

“Kia malsaĝeco atakis vin?” ekkriis la plej maljuna reĝo. “Ĉu tiu estas deca donaco porti al la Reĝo el Reĝoj en la malproksiman landon?”

Kaj la junulo respondis kaj diris: “Por la Reĝo el Reĝoj estas valoregaj donacoj, oro, olibano kaj mirho. Sed ĉi tiu estas por la infano en Betlehemo.

E. S. P.

Nurnberg, la 10a de Aŭgusto 1923  
Al la redakcio de Amerika Esperantisto  
en Boston, Mass.

Tre estimata redakcio,

Bonvolu enpresigi en la elirontan numeron de via tre ŝatata organo la ĉi subajn por la tuta Esperanta movado tre gravajn notojn.

Respektplene ni salutas antaŭe dankante  
Kristana Esperantista Ligo Internacia  
Paul Hubner, prezidanto.

**Kristana Esperantista Ligo Internacia.** Partoprenis ĉe la fakaj kunsidoj dum XVa Universala Kongreso de Esperanto en Nurnberg oficiala delegito de la Universala Komitato de vastega organizo: La Tutmondligo de Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (Y. M. C. A.), kiu enhavas preskaŭ 9,000 lokajn grupojn kaj proksimume 2 milionojn da membroj en ĉiuj partoj de la tero. Ĝi nun estas konstante reprezentata en la Kristana Esperantista Ligo Internacia per sia delegito s-o R. Horner, Genf, kiu feliĉe estas fervora kaj entuziasma Esperantisto. La Generala Kunveno de la K. E. L. I. konfirmis kiel oficialan organon “Dia Regno” kaj elektis specialan agadkomitaton kun jenaj tri anoj: P. Hubner, Bergstrasse la, Quedlinburg (Germanlando); H. A. Luyken, 23 Arcadian Gardens, Wood Green, London N 22 (Anglujo); R. Horner, 3 Rue General Dufour, Genf (Svislando).

## Surmonta Fonto

de

H. I. Keyes

Ĉe piedo de la monto,  
Eta domo en ombraĵo  
De arbara foliaĵo,  
Sola staras apud fonto.

Mia hejmo! kiel klare  
Daŭras en memoro mia  
Bildo de loketo ĉia!  
Ĝin prirevi—kiel kare!

Jen vojeto kondukanta  
Tra arbetoj superpendaj,  
Sub branĉegoj disetendaj,  
Al la fonto briletanta!

Jen la fonto! El sub ŝtono  
Akvo glitas tra la musko—  
Kantas en arbarkrepusko  
Kun murmura monotono.

Flanke, dornoj de kratago  
Florkaŝitaj ĝin defendas,  
Dum de supre svinge pendas  
Branĉoj de gardanta fago.



Super ia ŝtona breto,  
Pendas en kaveta ingo  
Pere de tenila ringo,  
Terkolora trinkvazeto.

Kruda benko el tabuloj  
Kiu en ombraĵo staras,  
Tenton al ripozo faras  
Por pasantaj soifuloj.

Tien per lanugaj veloj  
Fluge vagas papilioj;  
En maloftaj sunradioj  
Gaje ŝvebas la libeloj.

Ĉiu verda folieto  
Flustras al la lula vento  
Dolĉan kanton de kontento  
Je l'odora malvarmeto.

El la jaroj—el haoso—  
Jen juneco revenanta  
En vizio brileganta  
Je la vivmatena roso!

## La Unua Kristnasko

Kaj estis paŝtistoj sur la tiea kamparo, kiuj kamploĝis kaj nokte gardis sian ŝafaron. Kaj anĝelo de la Sinjoro alstaris apud ili, kaj la gloro de la Sinjoro brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili estis tre timigitaj.

Kaj la anĝelo diris al ili: Ne timu, ĉar, jen, mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo; Ĉar hodiaŭ estas naskita por vi, en la urbo de Davido, Savanto, kiu estas Kristo la Sinjoro. Kaj jen la signo por vi: vi trovos infaneton ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en staltrogo.

Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭ dante Dion kaj dirante: gloro al Dio en la supera alto, kaj sur la tero paco, inter homoj Difavoro.

Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭtistoj diris unu la alia: Ni iru nun ĝis Betlehemo, kaj vidu tiun ĉi diritan okazaĵon, kiun la Sinjoro sciigis al ni.

Kaj ili iris rapidante, kaj trovis Marion kaj Josefon kaj la infaneton kuŝantan en la staltrogo. Kaj tion vidinte, ili sciigis pri la diro, kiu estis parolita al ili pri tiu ĉi infano. Kaj ĉiuj aŭdintoj miris pri tio, kion rakontis al ili la paŝtistoj.

---

## La Esperanta Movado

en

## Norda Ameriko

Rev. J. H. Fazel of Topeka has sent out his annual circular through Kansas to friends who are or ought to be interested in Esperanto, giving them some news and asking for subscriptions and membership. In the circular he says:—"Once a year I do this work; no one asks me to do it; no one pays me for doing it. I love Esperanto and want to see it **win the world**. The cause of this great international language needs our help: it deserves our backing. I gladly do my best; won't you?" Would there were more like him.

The Cleveland Esperanto Society organized a class on November 12, of about twenty pupils, but had no suitable room. The Cleveland papers gave good notices of the class, and knowing

their need a down town real estate man offered a room suitable for the purpose.

Seminole, Okla. has just started a small group for the study of Esperanto. If interested, write to Jennings B. Smith, Box 281 for particulars.

Prof. Henry W. Hetzel, Secretary of the Philadelphia Society announces a LUDVESPERO every Thursday evening (except the third) meeting with samideano W. L. Mahn at his store corner Second and Chestnut streets, where "After 7.30 each meeting night members and their friends may drop in for conversation, games, reading and even songs—all in Esperanto." A number of the experienced members are "under bond" to be on hand and lead the program.

The Golden Age Esperantist (Box 223, City Hall Sta., New York) the new Esperanto and English propaganda publication, begun last summer by the International Bible Students who accept Esperanto as one of the evidences of the Golden Age, reports widespread and increasing activity. Among the study groups already organized are the following: Philadelphia, Harold W. Cline, teacher, 4818 Trinity Place; Denver, Lofton G. Hand, leader, 1150 California St.; Tacoma, C. A. Anderson, 2236 South K. St., teacher, Mr. Applegate (blind samideano); Birch Hills, Sask, Canada, Mrs. W. Jickels reports "We number ten here and have a jolly time with our Esperanto."

### NOVAJO DE PHILADELPHIA

La loka Societo entreprenis antaŭnelonge ion novan. Por pliofte kunveniĝi kaj por doni pli da okazoj por ludoj, konversacioj, legadoj, k. t. p., oni jam aranĝis ĉiujajdaĵajn kunvenojn de "La Ludvespero," krom laŭkutimaj triaj jaŭdoj. Sro. Mahn malavare metis sian butikon, 140 Chestnut Strato, je nia dispono por tiu celo.

La "Fratamurbo Grupo" perdis fervoran membron kaj estimategan amikon kiam mortis la 6an de Julio, Dro. Adolph W. Miller. Kvankam neaktiva en la aferoj de la Societo li fidele helpis la movadon diversmaniere. Dro. Miller estis ano de multaj sciencaj societoj, foje profesoro en la Universitato de Pennsylvania, kaj longtempe ĝis sia morto, je la aĝo de okdekdu jaroj, pogranda hemiisto kaj drogisto.

Sro. Hetzel faris paroladon pri Esperanto ĉe la Biblia Klaso de la Metodista preĝejo de Llanerch,—vilaĝo apud Philadelphia,—la 16an de Novembro. En la Oktobra numero de la "News Letter" de la Philadelphia Teachers Association li havis 1,200-vortan artikolon sub la titolo "Teachers and the Esperanto Movement."

## Recenzo

### WUSTER "ENCIKLOPEDIA VORTARO ESPERANTO-GERMANA."

No one who has seen this remarkable work, of which the first volume recently appeared, can longer doubt that Esperanto is rapidly taking its place among the national languages in importance.

A satisfactory and complete dictionary has been badly needed, particularly among more advanced students of the language. This immense work, all of which is already "prespreta," can only be compared with the most complete unabridged encyclopedic dictionaries, as, in U. S., Webster's or Funk & Wagnalls.

The work is invaluable to every Esperantist, whether familiar with German or not. Innumerable cross-references, synonyms, antonyms, etc., make the Wuster dictionary a satisfactory Esperanto-Esperanto encyclopedia. The following are extracts from a single half-page of the first volume: (only the Esperanto portions are quoted)

ADAPT-i (alfari, akomodĵi, laŭigi, konformigi, alĝustigi, konvenigi, alformi, almezuri, taŭgigi, similigi, aranĝi.)

ADEKVAT-a (egala, ekvivalenta, identa, konforma, konvena, sufiĉa.)

ADEPT-o (ensekretigito, inicito, malprofanulo, esotero, spertulo, konanto, praktikulo, eksperto, partiano, varbito, pledanto, samideano, neofito, prozelito, disĉiplo, sekvanto.)

The first volume (A-Cer) is now available. Orders are being taken for the second volume, and the work will be completed in seven volumes, about 1,200 pages, size 6¾ in. x 10 in. Paper and presswork are both of the highest quality. Order through the Esperanto Association of North America.

D. E. Parrish

Have you paid your subscription to A. E.? .....\$1.00

Have you paid your dues to E. A. N. A. this year? .....\$1.00

## Gazetoj Tutmondaj

La sekvantaj gazetojn alilandajn ricevis la Redaktoro:

“ARGUSO.”—Novembro-Decembro. Hispane kaj Esperante. Organo de Meksikujo. Tiu-ĉi numero enhavas artikolon en la hispana lingvo rilate al la XVa Kongreso Esperanta.

“LA VERDA ONDO.”—Organo de Formosa Esperanta Societo. Septembro. Japane kaj Esperante.

“La HOLANDA ESPERANTISTO.”—Oktobero. Holande kaj Esperante.

“La BULGARA ESPERANTISTO.”—Oktobero. Bulgare kaj Esperante.

“ESPERANTISTA JUNULARO” — Septembro-Oktobero. Tute en Esperanto. Enhavas diversajn artikolojn tradukitajn el naciaj lingvoj.

“La INTERLIGILO.”—Oktobero. Esperante skribita. Organo de la Unueca Poŝta Federacio de Francujo. Enhavas tre interesajn artikolojn de Sinjoro Hugues Lerisloy, “La Teleaŭtografo” kaj “Esperanto kaj la Telegrafo.”

“SENNACIECA REVUO.”—Novembro. Tute en Esperanto. Artikolo pri “Laborkondiĉoj de la Sovieta Proletario.”

“LUMTURO.” Politika gazeto tute en Esperanto. Enhavas legindan redaktoran artikolon pri “La granda germana revolucio kaj ĝia paso.” Ankaŭ artikoloj pri “La nuancoj en la germana framasanaro” de Dro. Kurt Floericke, Stuttgart, kaj pri “La telegrafono, interkoplajo de telefono kaj fonografo.”

“VEGETARANO.”—Oktobero. Trimonata Bulteno tute en Esperanto.

“La MOVADO.”—Novembro. France kaj Esperante.

“La LITVA STELO.”—Oktobero. Tute en Esperanto.

“NOVA MONDO.”—Julio. Unua Numero. Eldonata en Fortaleza, Ceara, Brazilujo. Gazeto por la studo pri la socia vivo de Ameriko kaj ĝia diskonigo en aliaj landoj.

“ESPERANTO TRIUMFANTA.”—Novembro 7. Tute en Esperanto.

“REVUO.”—Septembro. Monata Aldono de “Esperanta Triumfonta.” Tute en Esperanto.

“GERMANA ESPERANTISTO.”—Oktobero. Germane kaj Esperante. Enhavas plenan esperanteskribitan raporton pri la XVa Kongreso Esperantista.

“POLA ESPERANTISTO.”—Oktoebro. Preskaŭ tute en Esperanto. Enhavas tre bonan artikolon de Jan Kostecki, kiu kontraŭbatalas tiujn, kiuj volas dishaki la Esperantan lingvon.

“SVENSKA ARBEITAR-ESPERANTISTEN. — Oktoebro. Svedlingve.

“NORVEGA ESPERANTISTO.” — Aŭgusto-Septembro. Preskaŭ tute en la norvega lingvo.

“FRANCE-ESPERANTO.”—Oktoebro-Novembro. Dro. Edmond Privat skribas france bonan artikolon rilate al la tujza uzado de Esperanto. Tiu-ĉi artikolo estas tre entuziasmiga, kaj montras la valoron de la U. E. A.

“LA SEMISTO.”—Junio-Oktoebro. Preskaŭ tute en la kataluna lingvo. Eldono de la Esperanta Societo “Aplech.”



## One touch of Esperanto makes the whole world kin

Now you are going to make a start, which is the best way to begin?

It may be well to find out the Secretary of the local group and begin to attend the meetings.

Esperanto is so simple that you can easily teach yourself. Most of us did that.

Every beginner should have that indispensable helper, the “Edinburgh” Pocket Dictionary. Price \$0.75 and a Grammar, say Kellerman Reed, also \$0.75, with these you will be well equipped for the journey.

Certainly you should join the Esperanto Association of North America, and subscribe to “Amerika Esperantisto.”

Membership and Magazine is \$2 a year

Send to the Secretary, E. A. N. A.  
507 Pierce Bldg., Copley Square  
Boston 17, Mass., U. S. A.

## La Legendo pri la Postlasaĵo de la Maŭro

Rakonto de Washington Irving (daŭrigo)

Tradukita de D-ro Louis Allen, University of Toronto

“La plej granda,” diris la Maŭro, “kofrego fortikigita per ŝtalaj ligiloj, kaj plena de perloj kaj multekostaj ŝtonoj.”

“Ni nepre prenu la kofron,” diris la avida alkaldo.

“Mi ne plu malsupreniros,” obstine respondis la Maŭro; “sufiĉo sufiĉas por prudenta homo—la resto estas superflua.”

“Kaj mi suprenportos nenion plu,” diris la portisto de akvo, “por rompi la dorson de mia kompatinda azeneto.”

Trovinte ordonojn, minacojn kaj petojn egale senefikaj, la alkaldo sin turnis al siaj du adjutantoj: “Helpu min elporti la kofron,” li diris, kaj ni dividos ĝian enhavon inter ni.” Tiel dirinte, li malsupreniris la ŝtuparon, sekvata nevolonte kaj time de la alĝuazilo kaj la barbiro.

Kiam ili malaperis en la suban etaĝon, la Maŭro rapide estingis la flavan kandelon; la planko tuj fermiĝis kun la kutima bruego kaj la tri friponoj restis enŝlositaj sub ĝi.

Tiam li rapidege supreniris la diversajn ŝtuparojn kaj haltis nur kiam li atingis la liberan aeron. La Galicianeto lin sekvis tiel rapide kiel liaj mallongaj kruroj ĝin permesis al li.

“Kion vi faris?” ekkriis Peregil, spiregante. “La alkaldo kaj la du aliaj estas enfermitaj en la tero.”

“Ĝi estas la volo de Allah!” pie respondis la Maŭro.

“Kaj ĉu vi ne liberigos ilin?” demandis la portisto de akvo.

“Allah malpermesu!” diris la Maŭro, glatigante sian barbon. “Estas skribite en la libro de la destino, ke ili restos ensorĉitaj tiel longe ĝis iu estonta aventuristo venos por rompi la sorĉon. Fariĝu la volo de Dio!” Tiel dirinte, li ĵetis la stumpon de la vaksa kandelo malproksimen inter la densajn arbetaĵojn de la altaĵo.

Jam ne ekzistis plu alia rimedo, tial la Maŭro kaj la Galicianeto foriris al la urbo, kondukante la peze ŝarĝitan azenon. Survoje la bona Peregil karesadis kaj kisadis sian longorelan kamaradon, tiel neatendite revenintan al li el la ungegoj de la leĝo, kaj estus vere malfacila afero sciigi, kio donis al li la pli grandan ĝojon en tiu momento, ĉu la akiro de la trezoro, ĉu la reveno de la azeno.

La Maŭro kaj la Galicianeto dividis siajn riĉaĵojn amike kaj juste, escepte nur ke la Maŭro, kiu havis guston por gemoj, sukcesis pasigi en sian parton la plimulton de la perloj kaj aliaj multekostaj ŝtonoj, sed aliflanke li ĉiam donadis kompanse al sia kamarado valoregajn juvelojn el plej pura oro, kvinfoje pli grandajn, pri kio la Galicianeto estis tute kontenta. Dezi-

rante eviti ĉiujn akcidentojn, kiuj povus trafi ilin en Granado, ambaŭ plej rapide foriris por ĝuadi siajn riĉaĵojn en aliaj landoj. La Maŭro iris returne en Afrikon, al Tetuano, sia urbo de naskiĝo, kaj la Galicianeto, kun la edzino, la infanoj, kaj la azeno, forniĝis en Portugalujon. Tie Peregil fariĝis, sub la admonado kaj la instigado de la edzino, sufiĉe grava persono. Li devis vesti sian longan korpon kaj siajn mallongajn kru-rojn per elegantaj kamizolo kaj pantalono, kun plumo en la ĉapelo kaj spado je sia flanko. Sian ĝistiaman nomon, Peregil, li forlasis kaj prenis anstataŭe la pli sonoran titolon: Don Pedro Gil. Liaj infanoj kreskis kaj fariĝis sana kaj gaja, sed malalta kaj kurbkrura, generacio. Sinjorino Gil, kovrita per pasamentajoj kaj punktoj de la kapo ĝis la piedoj, kaj portanta brilajn ringojn sur ĉiuj fingroj, fariĝis la modelo de lastmodaĉa eleganteco.

Koncerne la alkaldon kaj liajn adjutantojn,—ili restis enŝlositaj sub la granda turo kun la sep subteraj etaĝoj, kaj tie ili restas ĝis la hodiaŭa tago. Kiam estos en Hispanujo manko de intrigantaj barbiroj, de malhonestaj algŭaziloj, kaj de korupteblaj alkaldoj, tiam oni eble iros elterigi ilin, sed se ili estos devigataj atendi sian liberigon ĝis tiu tempo, estas probable, ke ili restos ensorĉitaj ĝis la tago de la lasta juĝo.

## Amerika Esperantisto

Will you help us to make "Amerika Esperantisto" more widely known? A larger circulation means a better magazine, and a better magazine means larger circulation. We suggest that you get every member of your group to take it regularly. Show it to your friends. See that there is a copy in your public Reading Room every month. In these and other ways which may occur to you, help us to make "Amerika Esperantisto" an outstanding success.

Subscription \$1.00 a year.

"Amerika Esperantisto" 507 Pierce Building  
Copley Square, Boston 17, Mass., U. S. A.



**STRIKE WHILE THE IRON IS HOT—A CLASS THEN AND THERE**

**BOOKS and PROPAGANDA** Material of all kinds are on sale at **The ESPERANTO OFFICE**

Drop us a postcard asking for a catalog

**THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usona**

---

**MISERERE (Wagnalls) kaj THAIS (France)**

Po \$ .50.

**La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)**

**La AKROBATO de Nia Sinjorino**

**BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubin)**

**MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo dum la Milito  
(Giesy)**

Po \$ .35.

La unuaj eldonaĵoj tradukitaj de

**S-RO EDWARD S. PAYSON**

Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko

Ĉateblaj ĉe la Esperanto Office,

Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

---

**DEZIRAS KORESPONDI**

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

S-ro V. A. Platnikov, Rusujo, Moskvo, Ordinskij Tupik d. 6, Rv. 19, sendas salutojn al siaj malnovaj korespondantoj kaj deziras renovigi korespondadon kun ili. Ankaŭ deziras korespondadi kun Esperantistoj de ĉiuj landoj. Promesas respondi. Li povas interŝangi librojn, gazetojn, jurnalajn, p.k. aŭ leterojn, k.t.p.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberk, Ĉekoslovakia.

Chas. Scanlon, University, Alabama (Usono) kolegia studento deziras studentajn korespondojn. 11

Roy Johnson, 1168 W. 24th Street, Los Angeles, Calif., deziras korespondojn en ĉiuj landoj 11

---

**THE WRITER'S MONTHLY**

Edited by J. Berg Esenwein

A magazine of real help for those who write. Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it is practical."

Single copies 25 cents \$3.00 a year

THE WRITER'S MONTHLY, Dept. A  
Springfield, Mass., U. S. A.

---

**ATTENTION! ESPERANTISTS!**

**The LLANO PUBLICATIONS**

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work. It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

**LLANO CO-OPERATIVE COLONY**

Leesville, Louisiana.

---

**SKANDINAVA ESPERANTISTO**

Monata internacia gazeto, ĉefe en Esperanto, parte en sveda lingvo. Enhavas artikolojn pri lingvoj, scienco, propagando esperanta, informojn ĉiuspecajn, k. a.

Jarabono: duondolaro

Adm: Skandinava Esperanto-Instituto,  
419 Seventh St., Rockford, Illinois,

USONO

---

**ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO**

Reklamoj \$20. po paĝo— $\frac{1}{4}$  paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝanĝo \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

THE PERSON WHO NEGLECTS TO

# STUDY ESPERANTO

IS BLIND, DEAF, AND DUMB TO THE  
WORLD HE NOW LIVES IN

ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY  
REASONABLE INVESTIGATOR

as the one PRACTICAL auxiliary language  
Recognized and in use as such since the World War by:

The International Red Cross  
The World Union of International Associations  
The French and Italian Associations for the Advancement of Science  
The French Academy of Sciences  
The International Women's Suffrage Alliance  
The International Peace Bureau  
The International Labor Office  
The World Union of Women  
The Catholic International League of Youth  
The Young Men's Christian Association  
The International Bureau of Freemasons  
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle,  
Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg,  
Malmoe, and Helsingfors  
The Centennial Exposition of Brazil  
The Paris Chamber of Commerce  
and dozens of other organizations

UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY  
By vote of September 21, 1922

## HESITATE NO LONGER

ELEMENTARY and ADVANCED

### CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of  
NORTH AMERICA  
and courses by correspondence may be arranged for anywhere

(If you lack details as to local courses write today to)  
The Central Office of the Esperanto Association of North America  
507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies